

& Protestaj voĉoj:

< Rekante 17 el 35 batoj por strofo, entute 350 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Marĵorio Bultono (Marjorie Boulton) (Sennaciulo, januaro 1962; Sub la signo de socia muzo, 1987). Baladigis Martin Strid (2016) per angla popolmelodio.>

(#Melodio:

<:35> (

aa;LalTi /do3do TiLa Tido reedo;re mimi LaLa SoLa Mi La;Ti do3do TiLa Tido reedolre; miiLaLa doTiLaSo La La

(#Rekantaĵo: a;Ti do3do TiLa Tido re; mi3mi LaLa SoLa MiiLalTi; do3do TiLa Tido re; miLa doTiLaSo La La)

)×10)+

(& Strofoj:

'1 Ni2 /nun anoncas kun fiero, ; ke grandan bombon ni ĵus provis ; sukcese en la atmosfero2 ; ; rokebenajon ni disblovis.

(×: **Kviete paŝu en la ĉen'**, ; **kune finon ni alveno2s**, ; **Falas alte de fraksen'** ; **semoj dise sur la teron.**)

'2 Ni montris nevenkeblan forton. ; Skuiĝis nia tuta ter'!" ; "Disblovis vi malsanon, morton! ; Falas sterilo kaj kancer'!"

'3 "Ni estas nun pli altprestigaĵaj." ; "Aktiva jod' cent tridek-unu! ; Infanaj glandoj malfeliĉaj!" ; "Ni estas grandaj." "Dio punu!"

'4 "Nun plialtiĝas la impostoj." ; "La malamik' nin timos pli." ; "Stroncio naŭdek en la ostoj ..." ; "Kie sur ter' nin ŝirmu ni?"

'5 "Blindajn infanojn vi lotumas." ; "Neniu povos nin kontraŭi." ; "Jam leŭkemio min konsumas." ; "Ĉu morgaŭ povos nun morgaŭi?"

'6 "Ankaŭ cezi' cent tridek sep. ; "Kian infanon nun mi naskos?" ; "Kio okazos al la nep' ; Se kromosomoj mem fiaskos?"

'7 "Ni fortan pozicion ĝuas." ; "Ni sentas naŭzon, grandan lacon." ; "La homajn genojn mem vi skuas." ; "Per bomboj ni certigas pacon!"

'8 "Ni pezos en la konferenco." ; "La lakto estos venenita." ; "Plej glora estas la potenco." ; "Ve al kruelo hipokrita!"

'9 "Kancero, blanka sango, mortoj ; aĉegaj, venenad' aera, ; kaj idiotoj kaj abortoj, ; kaj misformiĝo enutera,

'10 en mond' de malbenitaj amoj – ; krioj de geamantoj altu – ; monstroj, cikatroj, ĝiboj, skvamoj, ; sepso, nekrozo : haltu, haltu!"